aton, oni tuj komprenas, kial ŝi ne laŭdis *lian* talion."

"Do jam ni faras progreson" li daŭrigis sinkontente. "'*Ni ĝin sciis*' tio kompreneble aludas la ĵurintojn. '*Al ŝi nur unu, du al li, Tri, kvar al ni li donis*' jen kion li faris disdonacante la tortojn."

"Sed" kontraŭdiris Alicio "la daŭrigo montras ke '*ĉiuj venis re al vi.*'"

"Kaj jen ili" triumfis la Reĝo, montrante sur la tablon. "Nenio povas esti pli klara pruvo ol tio. Ankaŭ tion ĉi atentu: '*Doloro vi for, ekkriis ŝi.*' Ĉu vi, mia kara, (turnante sin al la Damo) ne ordonis ke la Loro estu for? Tamen, jen li sidas!"

"Certege" kriis la Damo, kaj furioze ĵetis kontraŭ la Loron grandan inkujon.

La inkujo trafis — ne la Loron — sed Bil Lacerton. Tiu jam de longe ĉesis skribi per la fingro, ĉar li ne sukcesis fari per ĝi markojn; sed nun la kompatinda besteto laboreme rekomencis la fingroskribon, uzante la inkon, kiu gutfalis de lia vizaĝo.

La Loro tute ne atentis la inkujon; li nur ĝentile klinis sin antaŭ la trono kaj majeste marŝis for.

"*Doloro for!* Do, Loro, for!" la Reĝo ripetis per speciale atentiga voĉo, kaj cirkaŭrigardis la ĉeestantaron kun afabla rideto.



Sekvis tre embarasa silento. Fine la Reĝo devis anonci "Mi faris ŝercon" kaj—tuj la korteganoj aplaŭdis amase.

"La ĵurintoj konsideru la verdikton" diris la Reĝo, jam la dudekan fojon!

Ĉi tiun fojon la Damo interrompis. "Ne, ne" ŝi diris "ni havu unue la juĝon, kaj nur poste la verdikton."

"Vi parolas sensencaĵon" laŭte diris Alicio.

"Senkapigu ŝin" kriegis la Damo per ŝia plej alta voĉtono.

Tamen neniu ekmovis sin!

"Mi ne timas *vin*" diris Alicio (ŝi jam kreskis ĝis sia normala alteco). "Vi ja estas nenio, ——nenio krom ludkartaro!"

La tuta kartaro tuj suprenleviĝis en la aeron kaj ree flugfalis sur ŝin. Ŝi eligis krieton, krieton duone timan kaj duone koleran, penis forfrapi ilin kaj——

——trovis sin kuŝanta sur la deklivo. Jen la fratino vartis ŝian kapon sur la genuoj kaj forbrosas kelke da sekaj folioj falintaj de la arboj sur ŝian vizaĝon.

"Vi vekiĝu, Anjo, vi vekiĝu, kara" diris la fratino. "Vi ja tre, tre longe dormis."

"Ho, mi estas sonĝinta tian kuriozan sonĝon" diris Alicio.



LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN COLLECTION Octavo